
# *Díaz-Canel gratulas la sciencistojn de IFV pro efikeco de la vakcina kandidato Soberana*

*Image not found or type unknown*



**Bencomo klarigas rezultojn de la vakcina kandidato Soberana 02  kaj Soberana Plus kombine**

Havano, jul 9 (RHK) La kombino de du dozoj de la vakcina kandidato Soberana 02 kaj unu de Soberana Plus en la skemo de 0-28-56 tagoj havas efikecon de 91,2%, informis la dro. C. Vicente Vérez Bencomo, direktoro de la Instituto Finlay de Vakcinoj (IFV).

La raporton faris la doktoro en kunsido de la portempa laborgrupo de la registaro por prevento kaj kontrolo de la Kovim-19, kiun ?eestis anka? la ?efministro Manuel Marrero.

La unua sekretario de la komunista partio kaj prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel gratulis la teamon de la IFV kaj aliajn instituciojn partoprenintajn en la kreado de Soberana, “rezulto, kiu evidentigas kun kia forto laboris niaj sciencistoj”, li aldonis.

Vérez Bencomo memorigis ke la anonco de la efikeco de la skemo Soberana 02 kun Soberana Plus okazas ekzakte 415 tagoj  (a? 59 semajnoj) post la kunsido de la prezidento en la Centro de Ne?rosciencoj de Kubo kun grupo de sciencistoj kaj sciencistinoj petante labori por krei kuban vakcinon kontra? la viruso Sars-Cov-2.

Pri tiu kunveno, semajnojn pli frue, en la Centro de Genetika In?enierado kaj Bioteknologio (CIGB), kiam oni anoncis la efikecon de 92,28% de la vakcina kandidato Abdala, la prezidento mem malka?is ke li faris tian peton konvinkite ke la kubaj sciencistoj povus ?in atingi.

Vérez Bencomo klarigis ke la efikeco de 91,2% de la skemo Soberana rilatas al ?ia kapablo preventi la simptoman malsanon inter la imunizitoj.

Li atentigis ke la rezulto estis validigita en la fazo 3 de la klinika provo farita en ok municipoj de Havano, precize kiam cirkuladis en la urbo la stamo detektita origine en Sudafriko (Beta), “konsiderata kiel ´la besto´ rilate kapablon eviti la vakcinojn kontra? Soars-cov-2”.

La trajtoj de la stamo Beta, tamen, ne estas samaj al tiu de la stamo Delta, kiu estas tre konta?a, sed pli sentebla fronte al la vakcinoj.

Kiel asertis dro. Bencomo en anta?a kunsido kun la gvidantoj de la insulo, la sciencistoj de IFV ankora? estas meze de la vojo; “ankora? multo farendas, kaj ni ne ripozos ?is la tuta lo?antaro estu imunizita per la kubaj vakcinoj”, li emfazis.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/263362-diaz-canel-gratulas-la-sciencistojn-de-ifv-pro-efikeco-de-la-vakcina-kandidato-soberana

Radio Habana Cuba